

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA
:- PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al **W. NUTTERS**, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. :- :-

ABONO: jare 1 Sm. (holande: 1 gulden 20 cent), duonjare $\frac{1}{2}$ Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko. :-

Alvoko.

Al tiuj kamaradoj, por kiuj estas kara kaj necesa la prosperado kaj ĉiama kreskado de nia socialist-esperanta organo, mi turnas mian alvokon.

Kamaradoj! Depost kiam la internacia socialistaro komprenis kaj konvinkigis, ke la internacia lingvo Esperanto estas necesa por nia socialista movado, aperis la bezono al socialista-esperantista gazeto, aperis la bezono havi sian propran organon, per kies paĝoj ni povus disvastigi niajn ideojn. Tia organo fariĝis „I. S. R.” Ĝian ekaperon ĝoje aplaudis niaj ĉiuj gekamaradoj.

Ni memoras, ke estinte komence monata gazeto, la „I. S. R.” baldaŭ fariĝis du-semajna. Sed ne longe daŭris tiu bela tempo. La gazeto devis kontraŭbatali multajn malfacilaĵojn. La nombro da legantoj estis malgranda, proksimume ducent. Estas kompreneble, ke en tiaj cirkonstancoj la gazeto devis refariĝi monata. Oni nenion povis fari kontraŭ tio ĉi.

Sed de tiam pasis multe da tempo. Niaj vicoj, la vicoj de socialistoj-esperantistoj, plimultnombriĝis. Dank' al tio ĉi pligrandiĝis ankaŭ la kvanto da legantoj de nia organo.

Nun la „I. S. R.” havas jam de 6 ĝis 7 cent da legantoj. Dencve ekleviĝis la demando pri la pliofta aperado de la „Revuo”. Kaj, jen, en la numeroj de pasinta jaro komencis aperadi artikoloj kaj proponoj pri plioftigo de la gazeto. Oni parolis multe, sed . . . nenion oni faris. La gazeto daŭrigas sian monatan aperadon.

Kamaradoj! Se estis sensencaĵo fari 2-semajna la Revuon je komenco de ĝia akapero, la sama aŭ pli granda sensencaĵo estas lasi nun la „I. S. R.” monata. Multaj k-doĵ timas,

ke la 2-semajna aperado povas tute pereigi nian organon. Sed mi opinias, ke ankoraŭ pli danĝera estas restigi la nunan situacion. La lasttempa socia movado estas tiel diversa kaj interesplena por ni, ke kelkaj paĝetoj, aperantaj monate, tute ne povas doni, eĉ malgrandparte, prezenton de la nuna socia movado, prezenton de tio, „kio interesas la homaran vivadon” (celo de la „I. S. R.”) Hazarde mi havis la bonan okazon viziti nian k-don Nutters. Li montris al mi grandegan kvanton da materialo por la gazeto. Interesaj kaj legindaj estas ĉi tiuj tutmondaj sciigoj, rakontoj kaj artikoloj. Sed manko je spaco en la gazeto ĉiam devigas prokrasti la enpresigon de ĉi tiuj artikoloj „ĝis iu sekvonta numero (monato)”. Sed ĉiun tagon alvenas novaj artikoloj, kaj la arkivo de „fresa materialo” ĉe k-do Nutters ĉiam kreskas. Vane plendas la aŭtoroj de artikoloj, vane ili demandadas: „kiam, do, fine aperos mia artikolo?” La afero restas la sama. Mi eĉ timas, ke ĉi tiuj aŭtoroj ĉesos skribadi, ne vidante fruktojn de sia laboro! Kial verki por gazeto, kiu neniam povas enpresiti? Kaj tio ĉi estos nia plej granda perdo. Krom tio ĉi, la gazeto pro manko je spaco tute ne havas eblon enhavi eĉ malgrandajn literaturajojn — ĉu mi devas paroli pri la graveco kaj neceseco de la lastaj?

Do, kamaradoj, mi alvokas vin, elparolu viajn opiniojn kaj, ne restante nur babilantoj, sed ankaŭ agantoj, ni aperigu la „I. S. R.” du fojojn monate!

Certe, ankaŭ la 2-semajna aperado ne povos doni la plenan kontentigon, kiun ni dezirus havi. Sed, ni ne estu revuloj, ni agu laŭ ebloj.

Mi esperas, ke troviĝos kamaradoj kun mi konsentaj, kiuj subtenos mian proponon.

Aŭdigu vin, kamaradoj!

G. SEIDLER.

Ekzemplo: mi ricevis, inter 20—23a de majo: gravan artikolon pri la giganta havenstrikon en Braila, Rumanujo, kiu eble provokos ĝeneralan strikon; tradukon de nova manifesto de l' balkansocialistoj pri la Balkanmilito; anglan gazeton (Daily Citizen), kiu enhavas pasian, kortuŝan krion pro rajto de rusa propagandisto, arestita en Alexandrio laŭ peto de rusa ambasadoro; francan gazeton kun letero de bulgara soldato al lia edzino, pruvante ke nun bulgaroj mem komencas kalumnii. Sed, la junia n-ro jam estas kompostata, jam superplena — multaj jam kompostitaj artikoloj restis de maja n-ro!

RED.

La Balkanmilito.

IV. La eŭropa imperialismo en Turkujo. La socia kaj politika situacio en la turka regno ne estas, tamen, la sola kaŭzo de l' turka senpotenco transformi sin. Estas ankoraŭ alia kaŭzo: la rabista politiko de l' grandaj potencoj rilate al la imperio de l' Otomanoj. Tiu politiko nebligis renaskigon de l' turka ŝtato, kaj tial estas la vera kaŭzo de l' nuna sanga katastrofo.

La turkaj klopodoj al ekstermo de l' makedonaj bandoj, naskis unuiĝon de tiuj bandoj por komuna ribelo kontraŭ la turka regado (1903). Rusujo, tiam en milito kontraŭ Japanujo, bezonis sian tutan atenton kaj siajn ĉiujn fortojn kontraŭ sia orient-azia malamiko; ĝia intereso do estis, ke apud la sudlimo estu trankvileco. Kune kun Aŭstrujo, kaj en konsulto kun la aliaj grandŝtatoj, ĝi ellaboris programon de reformoj (programo de Mürzsteg), por „ripari la ordon” en la makedona konfuzujo. Tamen, pro intersia envio de l' grandŝtatoj, la plenumo de tiu programo ne povis okazi. Rusujo, malvenkinte, devis cedi siajn intencojn pri Orient-Azio; ĝi do povis denove sin turni aliflanken; pri la plenumo de l' programo ĝi ne havis plu intereson.

Kontraŭe — la turka regno estis ruiniĝonta pro tiu senfina enlanda konfuzo — des pli bona por Rusujo. La celo de l' rusa politiko ja ĉiam estis: plej eble malfortigi Turkujon, por iam povi meti la manon sur Bosporus kaj Dardaneloj (mallarĝa traveturejo inter Azio kaj Eŭropo), kaj havigi per tio al si liberan eliron el Nigra Maro al Mezlandmaro. En 1907 Rusujo interkonsentis kun Anglujo. Kaj kiam en 1908 Aŭstrujo akiris de Turkujo la longedeziritan permeson por konstrui fervojon al Saloniki, tiam deklaris Rusujo, envia, la trakton de Mürzsteg senvalora; kaj kune kun Anglujo ĝi faris novajn postulojn pri Makedonujo. Tiuj postuloj ofendis la nacian fierecon de l' turka armeo. La armeo ribelis, kaj 24an de Junio 1908 Abdul-Hamid estis devigata enkonduki parlamenton kaj proklami konstitucion. La jun-turkoj triumfis.

La jun-turka regado trovis treege komplikan situacion. Ĝi devis certigi sian „prestigon” enlande kaj eksterlande; ĝi devis peni liberigi sin de l' eŭropa bankkapitalismo, kiu, organizita en la „Dette publique Ottomane” kaj apogata de la grandŝtatoj, senkompate sangsuĉis la landon; ĝi, fine, devis havigi al si monon, por povi plenumi plej necesajn informojn, unue la konstruon de fervojoj.

En ĉiuj ĉi taskoj la jun-turka regado malsukcesis.

Ĝi ne sukcesis certigi sian „prestigon“; ĉar, 1908 Aŭstrujo aneksis la turkajn provincojn Bosnujo kaj Hercegovino; la vazalŝtato Bulgarujo proklamis sin sendependa. La armeo estis forte germanama; Anglujo pro tio subtenis la kontraŭ-revolucion; tiu malsukcesis: la armeo iris al Konstantinoplo kaj en 1909 la sultano estis forpelata; tamen, Anglujo ne ĉesis sian agadon. Ĝi faris ĉion por malhelpi kaj necebligi la disvolvon de Turkujo. En tio ĝin helpis la kunliganoj: Rusujo kaj Francujo. Anglujo proklamis la regionon ĉirkaŭ la Perza maro „Angla influfero“.

Turkujo nek ankaŭ sukcesis liberigi sin de eŭropa bankkapitalo. La bezono pri mono ĉiam pligrandigis; la grandŝtatoj faris ĉion por pliakrigi tiun bezonon. Dume, Turkoj povis en Turkujo mem nenion fari. Se ili volis starigi monopolon je papero por cigaredoj, aŭ je ludkartoj, ekzemple, tiam tuj protestis Aŭstrujo kaj Francujo; je petrolo, tiam kontraŭstaris tion Rusujo, k.t.p. Anglujo malpermesis, ke la limimpostoj estu plialtigataj de 11 al 15 %. Kaj la grandaj bankoj rifuzis novajn monpruntojn.

Ankaŭ la fervojproblemo naskis ĉiajn malfacilaĵojn. La konstruo de fervojo al Bagdad, kiu estis malfermonta la Malgrand-Aziajn provincojn de Turkujo por la tutmonda komunikado, estis permesata al kompanio, kies ĉefa monohaviganto estis la Banko Germana. Anglujo timis tiujn fervojon kiel minacon por sia pozicio en Hindujo kaj Egipto. Per tiu fervojo ja Germanujo akiros gravajn interesojn en Malgrand-Azio, do en parto de l' trans-tera vojo al Hindujo. Tiu fervojo, plie, kapabligos Turkujon fortigi sian potencon, malfermos al ĝi novan fonton de enspezoj, tio signifas, ke Turkujo povos fariĝi potenca najbaro, do danĝera najbaro, de la granda rabo-regiono de Anglujo: Hindujo. Danĝera tio estos por Anglujo, unue ĉar granda kaj forta ŝtato mohametana fortigus la naciajn movadojn inter la mohametana loĝantaro de Hindujo kaj Egipto.

La grandŝtatoj do malebligis al Turkujo enkondukon de reformoj. Ili intence senfortigis la turkan regadon; ili ĉie akcelis ribelojn kontraŭ la jun-turka reĝimo. La Araboj ekribelis, helpata de Anglujo. En Armenujo faris Rusujo sian hipokritan politikon: ĝi sekrete instigis je ribelo la kurdojn, malkontentajn pro la nova reĝimo, ĝena por ilia ĉefa metio: rabado; la jun-turkoj cedis, kaj la kurdoj tuj reprenis la rabistan metion kontraŭ la armenaj kristanoj-terkulturistoj;

tiuj lastaj plendis, kaj Rusujo sin prezentis kiel ilia protektanto! En Albanujo du aliaj ŝtatoj, Aŭstrujo kaj Italujo, subtenis la fajron, kaj celadis al fondo de iu „aŭtonoma“ Albanujo, t. e. nova „sendependa“ ŝtato, forliverita al ilia influo. Ankaŭ en Makedoniaj aferoj la grandŝtatoj havis la manon. Ĉiuj grandŝtatoj konspiris por materie kaj morale malfortigi Turkujon. La lasta bato al la jun-turka reĝimo, kaj per tio al la ebleco de renaskiĝo de Turkujo, estis la rabista ago de Italujo, kiu, kun permeso de l' grandŝtatoj, okupis Tripolis. Turkujo, svenanta pro enlanda konfuzo, ne povis defendi Tripolis. La kontraŭ-revolucio ekleviĝis; ĝi triumfis; en la somero de 1912 la jun-turka reĝimo ruiniĝis.

Laboristaro kaj lingvaj aferoj.

La diskuto pri vidpunkto de laboristaj e-istoj al lingvaj demandoj en Esperanto, komencita de k-do Panlou, certe estas grava kaj meritas objektivan pripensadon. Jen kelkaj rimarkoj miaflanke.

1. Estas trograndigata la signifo de la unueca fundamento. Ne estas vere, ke la lingvo devas havi kontraktitan fundamenton, kiu devas esti senĉese respektata eĉ kun siaj eraroj. La sola fundamenta bazo de la lingvo devas esti ĝia preciza taŭgeco por ĉiufankaj celoj, kaj ĝia interna senerareco. Sole la lingvo tiele bazita povas esperi je sia propra venko. La lingvo, eĉ plej fidele „fundamenta“, sed enhavanta erarojn kaj mankojn, ne meritas propagadon kaj ne povas venki. Estus nesocialiste kaj kontraŭprogrese, se ni volus konscie toleri en la lingvo erarojn.

2. Ne estas vere, ke la lingvo pereus, se ĝi ŝanĝiĝadus paŝo post paŝo. Kelke da fidelegaj fanatikuloj ne povus esti respektataj tie, kie estas en la ludo gravegaj interesoj de estonta kultura epoko. Jam simpla sesjara ekzisto de senĉese ŝanĝiĝanta ldo pravas, ke la lingvo povas ŝanĝiĝadi kaj malgraŭ tio ne pereos. Tiuj, kiuj efektive amas la ĝeneralan, altan ideon de mondlingvo, sole pro ĝi mem, restos fidelaj al lingvo malgraŭ iom da penado, kiun kaŭzas reformado kaj lerno de novaj formoj. Kaj la poŝtmarkokolektantojn kaj aliajn „samideanojn“, kiuj la profundecon de mondlingva celado tute ne estas komprenintaj, ni ne bedaŭru, kiam ili foriros. Por ili ni ĉiam gajnos aliajn.

3. Oni ne ripetu senpense la frazojn de burĝaj e-istoj pri unueco, fideleco, fundamento, esperantismo. Ni socialistoj

nepre devas esti kritikemaj. La burĝa e-staro kreis al si veran novan lingvan nacionalismon, Esperanto-patriotismon, kiu estas same malprograsa, frazoplana kaj kriegema kiel ĉiuj ceteraj nacionalismoj, bazitaj sur lingvoj naciaj. Tiu verdstelista ŝovinismo, kutime belnomata „esperantismo” aŭ „interna ideo esperantisma” vidiĝas diversmaniere: per ridinda „agitado” per verdaj standardoj, kravatoj, steloj, per la pasia ofta laŭte esprimado de la nomo „Esperanto” antaŭ fremdaj homoj, per senmotiva aĉetado de ĉiuj senvalorajoj, sole kiam ili portas verdstelan signon, per subtenado eĉ de la plej videbla trompo, kia estas ekz. „Esperanta kolonio en Brazilujo” kaj „Esperanta Park-urbo en München” k.t.p.

4. Ĝuste sur tiu ĉi verdstela ŝovinismo estas bazita ankaŭ la superstiĉo pri „fideleco al fundamento.” Kelkaj centoj da riĉaj homoj, kiuj havis la monon kaj tempon, faris ekskurson al Boulogne sur Mer, tie „babiladis”, koncertadis kaj amuzis sin reciproke pri sia nove eksentita stranga ŝovinismo de verda stelo, kaj tie kun aplaŭdo, tute ne diskutinte pri ebla scienca kritiko, pri tasko de mondolingvo kiel ilo por edukadi homaron, oni simple per levo de manoj donis al si katenleĝon, kiu ankoraŭ nun devas esti por ni netuŝebla kaj sankta! La demando pri interna valoro de la lingvo estas pure scienca kaj teknika; sed ĉu oni povas pri sciencaj demandoj decidi per — voĉdonado?? Ĉu oni iam vidis, ke ekz. pri signifo kaj uzado de la radiumo aŭ de la salvarsano oni — voĉdonis? Kaj fine: ĉu ekz. pri lingvaj demandoj de lingvo franca oni lasos decidi ĉiujn francojn per voĉdonado, ne zorgante, ĉu ili ĉiuj ankaŭ scias plene taksii la demandon kaj konas ĉiujn sekvojn de sia decido? Ĉu ekz. iu ajn franco kuraĝos paroli pri lingvaj demandoj de franca lingvo kaj permesadi aŭ malpermesadi al la kompetentaj profesoroj la necesan por ili precizigon de l' esprimado? Sole en esperantistaro ĉiu komencanto aŭ ĉiu filatelisto, kiu apenaŭ ellernis la ŝlosilon de Ĉefeĉ kaj neniam eĉ vidis la sciencan vortaron, volas kritikadi la lingvon de tiuj, kiuj serioze penetradis en ĝian riĉecon dum longaj jaroj.

5. En esperantistaro tiu ĉi „terorismo de nekompetentuloj” mirinde grandigis, kaj neapartigeble estas interligita kun la nomita „verdstela ŝovinismo”.

6. La plej danĝera kaj plej klas-akre burĝa estas la fidelista sistemo de du lingvoj, unu „popola” kaj unu aparta

„teknika” por sinjoroj. Mi faris dum mia ĝisnuna laborado en laborista movado minimume du cent prelegojn pri diversaj temoj, precipe pri naturscienco, popoledukado kaj organizado de l' intelekta laboro. Kaj el propra sperto mi asertas, ke estas neniam diferenco inter lingvo „popola” kaj „teknika”. En la plej populara prelego ni estas devigataj uzadi specialajn vortojn kaj ĝuste de la maniero de esprimado dependas, ĉu la prelego efikos aŭ ne. Se ni uzas, parolante pri ia preciza temo, neprecizajn, oportunajn vortojn, ni ne povas vekii en cerbo de aŭdantoj sufiĉe klaran komprenon. La samo estas prava pri artikoloj en journaloj. Ekzemple la diferencigo de la du tute malsamaj esprimoj kiel „feliĉo” kaj „fortuno” estas absolute necesa, se ni volas eduki la homojn al klara pensado. Kaj estas multe da similaj okazoj. Laŭ fidelistoj estas en tia okazo pli bone, kripligi la penson. Sed laŭ mia simpla racio estas pli pardoneble kripligi la superstiĉon pri fundamento kaj esprimi precize la dirotajon.

7. La ĉefa punkto de ĉiuj lingvaj demandoj en Esperanto estas: Ĉu la mondolingvo estas rigardota kaj juĝota laŭ estanteco? Aŭ ĉu ĝi devas direktiĝi laŭ bezonoj de la estonteco? Unuaokaze, sufiĉas havi lingvon servontan al komercistoj, vojaĝantoj, amuza literaturo k.t.p. Sed se ni akceptos, ke la ĉefa tasko de mondolingvo apartenas al estonteco, kiam ekzistos sole unu pli alta kulturo por ĉiuj homoj, tiam mondolingvo ne estas jam rigardebla kiel helpa lingvo, sed kiel estonta ĉefa kulturlingvo. Sed tiam ĝi ne povas servi al oportunismo de maldiligentaj homoj, kiuj ne volas studi longan gramatikon. Ĝi devos esti absoluta scienca kaj preciza.

8. Ĉar ni laboristoj akceptas por estonteco la principon de plialtigo de klereco de laboristoj, ni devas ankaŭ prepari precizan, science kapablan mondolingvon por ĝi.

9. Estas nekontesteble, ke nuna Esperanto enhavas multe da diversaj mankoj kaj eraroj. Nuna Esperanto Zamenhof'a estas sole radiko, el kiu estonta definitiva lingvo elkreskos. Tio ne estos sen ŝanĝoj. Oni nun multe parolas pri „natura evoluo” de la lingvo, sed en efektiveco tio estas sole tuko por surkovri la fakton, ke la lingvo estas enkatengita de la fundamentista superstiĉo kaj ne evoluas. Ankaŭ la „natura” evoluo devas esti direktata de unu kompetenta centro, kaj postulos videblajn ŝanĝojn. Sed oni netimu ilin.

10. La lingvo Ido, kvankam ĝi historie devenas el Esperanto, nun ne povas esti jam rigardata kiel ia reformita

„Esperanto”, sed kiel lingvo principe alia, ĉar ĝi ŝanĝis la fundamentajn principojn de Esperanto.

11. Principa diferenco inter Ido kaj Esp-o estas, ke 1. en Esp-o la signifo de ĉiu vorto estas destinata sole per la elementoj, en ĝi efektive entenataj. La vortfarado en Esp-o estas bazita sur asociado de la imagoj. 2. La signifo de la vortoj en Ido dependas de la vojo, per kiu la vorto estis derivita; tio estas kopiado de vivantaj lingvoj, historismo, sed principo kontraŭscienca. Sekve Ido ne povas esti nia lingvo.

12. Lingvo Kosmopolita de René de Saussure estas organike kunligita kun Esperanto, konservis ĝiajn principojn kaj entenas efektive sciencajn novaĵojn, sed ankaŭ kelkajn mallertajojn. Ankaŭ ĝi ne estas preta kaj pro tio ni ankaŭ ĝin ne povas ankoraŭ aprobi. Sed ni devas pripensadi la aferon sen burĝa konservativeco, kaj kuraĝe.

F. J. CHALOUPECKY,
kunredaktoro de „La Kulturo”.

Praha, la 1an de Majo 1913.

SOCIA MOVADO.

El Anglujo.

The Daily Herald. La ĉiutaga angla socialista ĵurnalo havas la supran nomon, kiu signifas „ĉiutaga sciig-isto”. Ĉar mi estas amanto de nia sola revolucia socia ĵurnalo, mi deziras interesigi mian ĉiulandan kunlegantaron pri ĉi tiu ĵurnalo. Mi klarigu. La jarrevenon de ĝia nask-tago ni ĵus vidis, malgraŭ la fakto, ke ĉiaj homoj profetis rapidan morton. La plej severa kulpo (laŭ ĝiaj kritikuloj) estis la troprogresemeo. Kuraĝe la redakcio helpis la sindikalismen, la feminismen, eĉ toleras anarĥismen kaj afable raportadis iliajn faradojn; plue, la redakcio eldonis ĉirkuleron presitan Esperantlingve, petante la helpon de ĉiulandaj kamaradoj por ĝiaj paĝoj; pli ol tio, en ĝiaj paĝoj konstante troviĝas pri-esperantaĵoj, kaj nia speciala propra ĵurnalo, „La Internacia Socia Revuo”, ricevis ofte honoran mencion, la speciala numero I. S. R. ricevis bonegan anoncon. Nu, nu, kiam ni indigās al niaj amikoj?

Vere, ne kostas multon kaj sur poŝtkarto vi povas skribi sufiĉan verajon eĉ kontentigi kapitaliston. (La redakcio kontentiĝos per eĉ nemultaj vortoj). Adresu raporton al „Daily Herald”, Victoria House, Tudor St., London E. C.

Strikoj ĉie daŭras; pleje kun sukceso.

La Kooperativa Unuiĝo raportas sukceson; oni kalkulas 2876892 anojn hodiaŭ, la pasintan jaron 2769531.

La polic-rabvizito al la oficejoj de la feministoj estis, laŭ kapitalistaj kaj reakciaj ĵurnaloj — granda surprizo! Kiom granda tamen, vidiĝis kiam malgraŭ la fakto, ke la policaro ŝtelis ĉion, manuskriptojn k.t.p., la ĉiam kuraĝa „Daily Herald” malgraŭ la registara ordono eldonis la feministan organon „The Suffragette” post nur nemultaj horoj. La redaktoro eldonisto estis arestata. Kiel li fartos, ni ne scias, ĉar la tutan estraron la registraro arestis; kaj sub kulpigo de „konspirado” ili devos aŭskulti al la seriozaj vortoj de niaj instruitaj juĝoj. La policaro rompis kunvenon en Londono, kie 30000 personoj kunvenis laŭ la angla kutimo de subĉiela parolado. La aŭtoritatoj esperas haltigi nian liberan paroladon; tamen, ni vidos, kion ili gajnos, nuntempe ili kontentiĝis per la aresto de kelkaj personoj kaj la frapado k.t.p. de aliaj.

HOYLE.

„Honoro al la meritanto” estas lerneja proverbo. Ĉiam mi estas rigardanta por eltrovi raportindaĵojn pri la agado de nia granda „Laborpartio”, fine mi trovis ion favora. La lasta raporteto priparolis la policrabadon de la oficejoj kaj presejoj de la feministoj; ankaŭ la presadon de la oficiala ĵurnalo per „Daily Herald”, kiu post nur kelkaj horoj, eldonis tiun revolucionan ĵurnalon, la sekvo estis la tuja aresto de la presisto de la „Herald” — K-do Drew, plej bedaŭrinde, akceptis sian liberecon, kondiĉe, ke li ne plu presigos ĉi tiajn nelegajn presadojn. Nun mi ĝojas raporti, ke la prezidanto de la laborpartio, kiu kutime estas la plej malsovaĝa homo, akceptis presigi la „Suffragist”. Ĉia honoro al li, neniam estis la sorto de libera parolo atakata kiel nun kaj neniam estis la tuta regularo tiel bone avertita kaj interkonsentanta kiel nun: La frukto de reakcio estas revolucio, la rikolto estu rapida.

La konferenco de la Brita Socialista partio okazis en Blackpool, tumultemaj estis la kamaradoj, sed la tono de la konferenco estis ĝenerale bona. La rezolucio konsentante formi parlamentan kason, ne estis surprizo al tiuj, kiuj rimarkis la plej multecon de la malnovaj socialdemokratoj en la vicjoj de la B. Ep: sed la sento al sindikalismo estis neŭtrala, tiu montras pli toleran spiriton ol mia lastjara raporto.

La unua de Majo, ricevis bonan subtenon en Londono;

giganta demonstracio tie okazis, bedaŭrege, mi nur povas raporti ke la provincaj centroj kontentiĝis per demonstracio je la unua dimanĉo de Majo (la 4an). Angloj tro ŝatas laboron anstataŭ festi laboran tagon.

Nuntempe regule aperas citaĵoj el la I. S. R. en la ĉiutagulo „Daily Herald” (al la profito de ambaŭ ĵurnaloj sendube); tial, kamaradoj, sendu viajn naciajn raportojn Esperante skribitajn al la redakcio. „Daily Herald Press, Victoria House, Tudor Street, London. E. C.

La kooperativa kongreso en Aberdeen favore preparolis la pligrandigon de produktantaj societoj, kaj promesis helpi finance tiujn metiouniojn, kiuj aktiviĝas ĉi tiele.

Ni povas atendi gravajn movojn de la karbministoj kaj fervojistoj post ne longe, la perleĝa metodo de interkonsento estas malsukceso, (tigroj kaj ŝafidoj havas nur unu konsentmetodon kaj la laborklaso similas ŝafidojn — dum tiuj ĉi arbitraĵoj, ĉiam ili estas englutataj). HOYLE.

Kun bedaŭro ni komunikas al la k-doĵ, ke 23an de aprilo mortis en Chester, Anglujo, nia k-do J. W. Jones, agento de I. S. R. en nomita urbo; li estis tajloro, socialisto (I. L. P.). Tre juna, 36-jara, li eniris la eternan ripozon. Li laboris dum estis tago — solenaj pensoj de multaj kamaradoj sekvas lin en la tomo. Honoro al lia memorado. RED.

El Aŭstrujo.

Pri la afero Kunĉak-Schuhmeier mi ne scias multe. Mi scias nur ke Schuhmeier estis unu el plej bonaj propagandistoj soc. dem. kaj tre amata de ĉiuj eĉ de aŭtonomiaj soc. dem.

Pri Kunĉak mi scias nur, ke li estas klerikalo kaj mortigis Schuhmeier pli multe pro politikaj ol pro ekonomiaj aferoj. Kunĉak ne bezonis serĉi laboron inter soc. dem., ĉar li povus trovi ĝin inter klerikaloj, se li volus.

Kio koncernas la artikolon de K do Kolthek kaj de vi (I. S. R. n-ro 4, p. 88; n-ro 6, p. 136), mi respondas al vi jenon:

Ĉiu homo havas rajton vivi. Sekve, se troviĝas iu, kiu volas min malebligi mian ekzistadon, tiam mi kompreneble min defendos per ĉiuj fortoj, kaj se tiu homo ne ĉesus min persekutadi — mi pensas — ke neniu homo mirus, se mi tiun tiranon mortigus!

Al kamarado Kolthek ne estas tiu afero bone konata; li legis ion pri ĝi el malvera fonto.

Ĉe ni en Aŭstrio, precipe en Vieno, estas similaj persekutadoj sur la tagordo de la flanko de germanaj centralaj soc. dem. kontraŭ anarĥiistoj kaj eĉ kontraŭ propraj samcelanoj — aŭtonomiaj soc. dem.!

Se iu anarĥiisto, aŭ aŭtonom. soc. dem., ricevas okupon en fabrikejo kie regas centr. soc. dem., li devos tuj forlasi la laborejon kaj se tio al ili nesukcesas, ili proklamadis strikon! Jen ekzemplo:

Pasintan jaron en ŝufabrike Fischer und Goldschmid en XV Viena distrikto, pro tre mizeraj labor- kaj vivkondiĉoj estis proklamita striko. Krom aliaj oni postulis pligrandan salajron kaj mallongigo de labortempo.

Sed dum la striko eksciis la gvidistoj, ke ankaŭ unu aŭtom. soc. dem. estis kun ili okupataj kaj ili tuj ŝanĝis la postululojn.

Ili postulis de fabrikestro nur eksigon de tiu aŭtonomisto, kaj sub la malnova ordo estas la laboro reprenita!

Sed tio ne estis ankoraŭ ĉio.

Ĉe la forlaso de fabrikejo tiu soc. dem. estis tiel kruele de ankaŭ soc. dem. bategita, ke oni lin devis ekspedi en la malsanulejon! (Vorto post vorto estas vero).

Se mi volus skribi ĉiujn sovaĝaĵojn de centralistoj kontraŭ aŭtonomistoj, kreu ke mi devus skribi tre dikajn librojn. Kaj kontraŭ aliaj, ekzemple anarĥiistoj? Mi ne skribos.

Germanaj centralistaj soc. dem. gvidistoj proklamis publike, ke aŭtom. soc. dem. oni rigardu kiel neorganizatojn kaj kiel malamikojn de laboristaro!

Al la aŭton. kiuj estas devigitaj aliĝi, pagi al la centralistoj, oni malpermesis legi aŭton. organon „Delnické Listy” kaj rekomendas al ili, se ili ne volas legi centralistajn gazetojn, ke ili legu „Kronen Zeitung” (klerikala gazeto). Okazis ofte, ke la kunvenoj de aŭtonomistoj estas atakataj de aro da centralistoj kun tranĉiloj, bastonegoj kaj eĉ kun revolveroj kaj mi efektive miras, ke iu el la atakatoj ne mortigas el malespero sian tiranon. En lasta tempo en Vieno unuigis aŭtonomistoj kun anarĥiistoj por kontraŭstari la centralistajn teroristojn.

La gazeto „Kulturo” apartenas ankaŭ al la aŭtonomistoj.

F.

Skribinte en 4a n-ro. de nia revuo, pri embuska mortigo de Schuhmeier, mi antaŭsentis ke k-doĵ, en eksterlando bezonas pli detalan priskribon de la tuta afero. Mi estus tion

farinta — sed naiva mi estis, opiniante ke krimo de tiu ĉi speco, almenaŭ en eksteraŭstriaĵ gazetoj, estos laŭ merito senpartie prijuĝata kaj laŭ efektivaĵ faktoj priskribata.

Sed nun, kiam mi legis ambaŭ notojn de la red. k-do N. kaj kiam mi sciigis pri skribmaniero de la Holanda gaz. „Laboro”, kies redaktoro aplaudante rekomendas imiton al Laboro-legantoj, mi rapidas reveni al la afero.

Antaŭ ĉio sciuj k-doĵ, ke mi mem estas de jaro 1905 okupata ĉe sama firmo ĉe kiu Kunĉak la saman jaron ek-laboris. En tiu jaro okazis (laŭ klerikalaj gaz. kaj laŭ Koltheke) lia persekutado. Sciuj ankaŭ, ke el 1200 tie okupataj laboristoj 95 % estis soc. demokratoj.

Kvankam laborista forto neniam estas laŭ merito sufiĉe bone salajrata, tamen estas konstata, ke en tiu ĉi fabriko la kondiĉoj por vendanto de sia laborforfo estis pli akcepteblaj, ol en iu ajn alia fabriko en Vieno. Jus tiam estis atingita naŭhora labortago, ĝenerala plialtiĝo de la salajro, je sabato libera posttagmezo kaj aliaj diversaj malpli gravaj plibonigoj.

Ĉio ĉi estis atingata per la forta influo de la soc. dem. ligo metallaborista. Je tiuj cirkonstancoj estas ja memkomprenebla devo de ĉiu laboristo, atentigi novulon (sen escepto, ĉu indiferentulo aŭ alipartiano) pri merito de la soc. dem. organizajo. Nur tiam estas eble, daŭre konservi la atingitan plibonigon, se laboristoj de l' sama fabriko ankaŭ same konsentas, kaj se inter ili ne estas perfidaj animoj.

Kiel kutime ĉiu novulo, ankaŭ Kunĉak, estis de tiu tempaj deputitoj: K-doĵ Saumwald kaj Schwarzböck, ĝentilmaniere invitataj al aliĝo.

Nu — kio okazis? — Kunĉak malĝentile rifuzis tion fari, kaj la laboristoj, vidante en li danĝeran spionon, diris ne voli kun li labori. Kunĉak Paŭlo nun kun helpo de sia frato Leopold (parlamentara deputito) akuzis la nomitajn k-doĵn ĉe distrikta juĝisto pro perforta senpanigo. Ĉar ĝis tiam en Aŭstriaĵ juĝejoj la plendo de tiu ĉi speco ne estis juĝata, tial ĝi ricevis eksterordinaran signifon. 1) Por niaj metio-deputitoj en tiu ĉi afero estis iu fleksebla ŝ trovata, laŭ kiu, ili estis arestataj po 14 tagoj, sole pro tio ĉar ili plenumis la volon de ceteraj laboristoj. Ĉi tio estis de Kunĉak unua venĝo kaj la dua sekvis nun post 7 jaroj. (Vidu nron 4an paĝo 87).

1) Se unu aŭstriaĵ juĝisto permesas al si memvole kripligi iun ŝ-on pli ol ĝi jam estas, oni uzas ĝin en ĉiuj juĝejoj por pluaj similaj aferoj.

Paulo K. ne estis do pelata kiel sovaĝa besto; ĉi tio estas pruvita per laboratesto en lia atestlibreto. Vero kaj fakto estas, ke de soc. dem. laboristoj li estis unufojon forigata de laboro, el „Graf kaj Stift” aŭtomobilfabriko. Tio okazis la 23an de novembro 1905, ne pro lia politika konvinko, sed ĉar la laboristoj de tiu fabriko legis la 21an de Novembro raporton pri supre nomita hontproceso.

En Decembro 1905 li laboris ĉe firmo „Schott kaj Schildorfer” ĝis 1907. Pro manko da laboro senpanigis lin la firmo. De 3 Julio 1907 ĝis 7a Septembro 1907 ĉe firmo „Grünn”. De ĉi tie li memvole foriris. De la 2 Novembro 1907 ĝis 2 Aŭgusto 1910 ĉe firmo „Roth”, ankaŭ ĉi tiun fabrikon li memvole forlasis. De 5a Oktobro 1910 — 18 Januaro 1911 ĉe „Friedmann”. Pro manko da laboro de ĉefo forigita. Fine li laboris de 20an de Januaro 1911 ĝis 14a Junio ĉe iu al mi nekonata firmo en Hangasse. (Kion li faris lasttempe, montriĝis dum la proceso, antaŭ kelkaj tagoj. Red.)

Jen k-doĵ estas faktoj pri lia persekutado. Mi ne sole direktas min laŭ gazetoj, sed mi persone demandis k-don Saumwald, tiama deput. pri tio; kaj tiu ĉi atestas tion per sia subskribo. (K-do Schwarzböck estas en Ameriko).

La Vienaj legantoj de I. S. R. tute ne miras pri skribmaniero de la „Laboro”, ĉar ili nun scias el kies-fonto ĝia red. Koltheke ĉerpas la akvon.

Tiu fonto estas nomata „Reichspost” (monarka poŝto); ĝi estas klerikala ĉeforgano. Ĝi estas tiu gazeto kies redaktoroj eĉ kadavron de soc. dem. deputito Silberer, 1) kovris per mensogaj kalumnioj.

Se Koltheke daŭrigas sian skribmanieron en sama senco, tiam li havas kompatindajn legantojn „Laboro” kaj „Reichspost” redaktoroj — donu al vi manojn!

O.—B.

FRIEDRICH SAUMWALD.

El Belgujo.

Morto de Hector Denis. — Belga socialismo perdis pro morto unu el siaj plej estimindaj membroj. 10an de Majo mortis, en Bruselo, Hector Denis, deputito de l' popolo al belga parlamento, kie la antaŭan tagon li part-

1) Silberer kiel turisto mortis en Tirolaj alpoj sub neĝlavango. „Reichspost” grandlitere publikigis, ke li ŝtelis monon al bakista unio kies prezid. li estis; kaj ke li forveturis Amerikon; eĉ iun okulatestanton nomis Reichspost, kiu vidis Silberer en Nov Jorko. Post kelkaj semajnoj, kiam la neĝo degelis, S. estis trovata kaj en Vieno enterigata.

prenis la debatojn pri la financa situacio de Belglando. Oni trovis lin malviva en sia lito; „li mortis, diras „Antaŭen” de urbo Gent, kiel li vivis: laborante. Li atingis agon de 71 jaroj. Li estis multscia ekzercanto de l' sociaj sciencoj, parlamentano kies vorto havis influon, fidela amiko de l' proletariaro, aminda persono. La belga presaro socialista parolas kun profunda respekto kaj kun granda dankemo pri liaj servoj al socialismo.

„Hector Denis”, diras „Antaŭen” de Gent, „ne estis socialdemokrato en la ordinara senco de l' vorto. Li ne estis marxisto, sed plie ano de Proudhon, kiu atribuis plejan valoron al la persona iniciativo kaj volis vidi el ĝi naskiĝi la socialista socio, sen iu interveno de ŝtato.”

12an de Majo okazis la entombigo, kun grandioza partopreno el ĉiuj partoj de la lando. En la procesio estis sept cent standardoj de soc., liberpensaj kaj aliaj organizaĵoj; ses veturiloj transportis al la tombo florojn k.t.p.; post ili iris multaj deputitaroj, inter alie la tuta maldekstra flanko de l' parlamento. La enterigo de Hector Denis revivigis la unuajn tempojn de l' belga laborista movado.

El Francujo.

La 1 Maja numero de „Vorwärts” (Antaŭen), ĉeforgano de l' germana soc.-dem. partio, enhavis ĉefartikolon de l' franca socialista Jean Jaurès, pri la signoj de solidareco inter la socialistoj de ambaŭ landoj, dum la lasta tempo.

„La Franca burĝaro”, li diras, ĉiam asertis, ke la germanaj socialistoj estas viglaj patrujamantoj kaj, propre dirate, ne kontraŭstaras elspezojn por armeo kaj militŝiparo. Ĝi prezentis samtempe la francajn socialistojn kiel malamikojn, perfidulojn k.t.p. de ilia lando. Nun tio ekŝanĝiĝas. La senmaskigoj faritaj en germana parlamento sin trudas al ĉies atento. Multaj personoj, ekster soc. sferoj, kiuj timas militon, nun esperas, ke la nudigo de unu el la sekretaj fontoj el kiuj fluas la torentoj da instigado, kiuj venenigas la popolspiriton, ke tiu nudigo lamigos la influon de l' militemuloj. En Francujo mem ankaŭ tiaj senmaskigoj estas faritaj. La monto da trompado, starigita inter la du popoloj, do estas trafosata de du flankoj — kaj ambaŭflanke jam ekpenetras la lumo.

„Ke je la unua de Majo la internacia proletariaro leviĝu pli alten, pli forta ol iam antaŭe, super ĉiuj penadoj por ĝin sovaĝigi, super la sangaj, pestigaj nebuloj, kiuj ĉie malheligas la horizonton!”

Estas klare: la proletarioj de l' du grandaj landoj pli kaj pli proksimiĝas unu al alia. Ili sentas bezonon etendi la manojn unu al alia, esprimi sian fratecon, sen atenti la blekadon de patrujamanoj kaj de dividendopatriotoj.

En „Temps Nouveaux”, organo de l' francaj anarkiistoj, en n-ro de 19 Aprilo, k-do Nettlau, anarkiisto, avertas pri la stranga deziro de kelkaj anarkiistaj verkistoj kulturi ĉiurimede malestimon k.t.p. al germana soc.-dem. partio. Li konstatas kaj pravas per faktoj, ke pleje tiuj verkistoj tute ne konas, neniam studis nomitan partion, sed nekontrolinte kopias unu de alia la kalumniojn, kaj eĉ plej strangajn sencencaĵojn, al ĝi kraĉitajn de pro pasio blindiĝintaj malamikoj.

W. N.

Mi liberigas, neatendante, mian konsciencon de unu el ĝiaj eraroj.

Se mi estas erarema, mi estas ankaŭ korektema al mi kaj al aliaj.

„Egalec' jen vera leg'”.

Estas la oficisto, kaj ne „La Bellevilloise mem, kiu procesis kontraŭ „La Bataille Syndicaliste”. Tio estas vera.

Ĝi estas la jurnalo de la sindikatoj; oni metis gantojn.

„Le Libertaire” ne estas sama, tial oni formetis la gantojn. Tamen la serio da artikoloj estis farita de sindikatano Thuillier.

Alia eraro — komposteraro — je la paĝo 135, ĉe la malalta parto: legu 3 monatoj, ne 8.

Kio povas okazi en respubliko. Nia samideano Alfonso XIIIa, reĝo de Hispanujo, projektis de kelka tempo fari viziton al nia Raymond I.

Tia vizito ŝajnas facila. Sed ĝi ne estis.

Tiu sinjoro havas krimojn sur la konscienco. Li mortigis Ferrer, turmentis niajn kamaradojn en Montjuich, en Alcalá del Valle; la amasaj paŝadoj en Barcelono je la 1909a jaro, la persekutado al Queraltó, estas lia laboro.

La anarkiistoj 1) francaj unue protestis kontraŭ la deziro de la simia Moŝto.

Ili aranĝis mitingojn, sciigis la krimojn de tiu makako, al ĉiuj.

La unuan tagon de lia alveno, la anarkiista federacio kaj la ĝenerala federacio de l' laboro faris gravan protestmitingon antaŭ la ambasadorejo de Hispanujo.

Kompreneble, nia respubliko estis metinta siajn ĉiujn policistojn, spionistojn, sian tutan nerekomendindularon, je la servo de la hispana trono.

Eĉ hispanaj policistoj venis kaj arestis kamaradojn hispanajn en Bordeaux, Parizo kaj en multaj urboj de la landlimo.

La gazetaro, antaŭ la vojaĝo — kiam ĝi estis nur projektata — iom protestis, memorante pri la mortigo de Ferrer, kiun la kontraŭklerikaluloj, la liberpensuloj, montris, kiel unu el ili.

Sed, kiam la dato estis sciigita, tomba silento etendiĝis en la redaktoj. Nur la anarĥiistaj ĵurnaloj kaj la „Bataille Syndicaliste” ne silentis.

La rekompenco ne malfruis. „Le Libertaire” estis traŝercata, kaj la „Bataille Syndicaliste”, nur dank’ al la malfrua alveno, ne estis kaptata. La policistoj volis aresti la solan forton kapablan, per sia ĉiutaga protesto, fari la necesan laboron: starigi en unuanimeco la proletarianon kiu memoras; ĉar, ve! multaj ne plu memoras.

Post la leĝa ekkapto de la „Bataille Syndicaliste”, nur unu ĵurnalo protestis kontraŭ tiu „imperio” kaj ĝi estas burĝa, ĝia nomo estas „Le Rappel”.

Alfonso estis akceptata de tiu parto de l’ popolo kiu memoras, je la krioj „Vivu Ferrer”, „vivu Queralt”.

La sento de tiuj krioj estis antaŭe difinita, por ke ne estu konfuzo.

Nu, multaj kamaradoj estis arestataj.

Oni citis je tiu okazo — pro la punoj donitaj — ke en la jaro 1867a, kiam Aleksandro IIa, gasto de Napoleono IIIa, estis akceptata, Charles Floquet kriis antaŭ li: „Vivu Pollando, sinjoro”.

Tiu pruvo de kuraĝo estas ofte citita de niaj unuaj respublikanoj, kiuj admiris lin. Pro la sama kaŭzo ili nun kondamnas.

Jen la progreso. Feliĉe, aliaj promesis doni al ni kion oni jam promesis en la tempo de Gambetta! Aliaj promesos, ĝis kiam ni mem prenos.

Alfonso ne foriris kun la kontentigo en la koro. Sed baldaŭ estos la elspezaro pagata.

Laŭlonge de la vojo estis soldatoj francaj.

Antaŭ longe, tre longe, la reĝoj estis senkapigitaj. Nun ili ĉiuj venas Parizon. Junaj, kiel Alfonso de Hispanujo, Manoel de Portugalujo, oni elektas por ili la virinon kiu malvirigis ilin — por Manoel la peristo estis Briand — por la maljunaj kiel Leopoldo, Edouardo, k.t.p. estas Parizo la „plezura urbo” en kiu ili „manĝas” la monon de siaj regatoj.

La respubliko maljuniĝas.

Estas ankaŭ gravaj okazantaĵoj:

Striko de panfaristoj en Parizo; la soldatoj anstataŭas la laboristojn. Tial oni bezonas ilin 3 jarojn.

La veturifaristoj ankaŭ strikas.

La motivoj estas ĉe preskaŭ ĉiuj strikoj — kaj ili estas nun multaj — la mallongigo de l’ semajnlaboro aŭ de la taglaboro.

En la hospitaloj parizaj oni laboradas por forigi la laikulojn, dezirante meti la ekleziulojn kiel antaŭe.

Ni rejuniĝas?

A. PANLOU.

1) La vortaroj de Presa Societo Esperantista donas „anarĥio”, vidu „anarkio”. Ĉu mi devas ĝin korekti ankaŭ?

El Germanujo.

La laborista junulara movado en Germanujo ĉiam progresas, malgraŭ la malpermesoj de la registaro kaj la agado de la patriotaj asocioj. Pasas ne unu semajno dum kiu ne estas disigitaj kunvenoj de la laboristaj junuloj. En Germanujo ekzistas leĝo, kiu malpermesas politikon por la sub 18-jaruloj. La registaro rigardas ĉion, kio estas nomata per vorto „laborista”, kiel politikan aferon, sekve en Germanujo ne povas ekzisti junulara laboristara asocio kun kotizaĵo kaj statuto. Ĉiu kiu havas senton al klerigo, aĉetas la gazeton „Arbeiter Jugend” (Laborista Junularo) kaj kunvenas en la popoldomo aŭ alia destinita lokalo. Tie oni ludas aŭ legas. La socialistoj ankaŭ ofte paroladas pri naturo aŭ tekniko, pasinteco aŭ venonteco. „Sed ne tuŝu la politikon”, ordonas la policistoj. Dimanĉe oni faradas ekskurson. La plej alta celo estas la klerigo kaj ĉiu socialista kaj anarĥiisto scias, ke socialista aŭ anarĥiista ŝtato nur povos daŭre resti se la loĝantoj estas konsciaj pri ĝia administracio kaj kiel ĝi konstruiĝas. En Sud-Germanujo la leĝo ne tiel severe estas gardata: tie estas eble, ke ni havas en kelkaj urboj efektivajn unuiĝojn, sed tute senpolitika. Sed iom post iom ankaŭ tie ĉi penetras la prusa (t. e. preskaŭ rusa) sistemo. Kaj lasttempe okazis multe por subpremi nian movadon. Al lernantoj de la perfektiga lernejo estis malpermesata viziti tiajn kunvenojn. Jen ekzemplo kiel la polico agas.

En Königsberg okazis parolado por la junularo. La temo estis „Prusuja historio antaŭ 100 jaroj”. Malgraŭ ĝi ne estis politika, postulis la ĉeestantaj policistoj, ke la aŭskultantoj foriru. La parolanto plendis kaj ricevis la respondon, ke la polico estas opinianta, ke la tuta enhavo de la temo estas

politika kaj do rajtigas la policon malpermesi ĉeeston al ne 18 jaruloj. Nu, tio pruvas, ke jam la opinio de la polico sufiĉas por malpermesi la ĉeeston de junuloj.

Sed la tiea laborista junularo aranĝis protestkunvenojn. Per sia ĉeesto multaj esprimis sian malaprobobon de la polica agado. La patriotaj asocioj povas politiki, insulti la socialistojn, krii sur la strato dum la nokto k.t.p. Tial ili ankoraŭ estas subvenciataj. La soldata ludo al ili plej bone plaĉas. Ili portas la nacian flagon, sed kiam unu el niaj anoj dum ekskurso fiksis sur arbo ruĝan poŝtukon, li estas monpunata. Malgraŭ tio ĉi ni kreskas, malgraŭ la malpermesoj de la registaro ni havas politikon en nia kapo kaj scios, kian vojon ni iros. Antaŭen al lumo!

K. D., München.

El Hinujo.

Grava alvoko el Hinujo. La Internacia Oficejo Socialista en Bruselo ricevis al Shanghai ĉi-suban, angle skribitan leteron, de kiu la internacia sekretario, Camille Huysmans, afable transsendis kopion al I. S. R.:

„26an de Jan. 1913 aperis la unua socialista gazeto en Ĥina lingvo; ĝi nomiĝas „Ĥina Socialisto“; ĝi estas dulingva (en Ĥina lingvo kaj Esperanto); la Ĥina eldonanto petas, ke oni sendu korespondaĵojn kaj artikolojn en Esperanto; oni adresu ĉion al li: No 1, An Lan Road, Shanghai, China.

Jen okazo por ĉiu socialisto-esperantisto, helpi la socialistan movadon en Hinujo, ĉar ĉiaj artikoloj en Esperanto estas facile kaj korekte tradukeblaj en Ĥinan lingvon kaj certe ili estos publikataj. Kiu volas helpi meti la Ĥinan socialistaron en tuŝon kun socialistaj ideoj? Per konstanta interŝanĝo de ideoj la Ĥinaj socialistoj estos tenataj en rilato kun socialista movado en aliaj partoj de l' mondo, kaj tio naskos unuecon. Proletariaro de ĉiuj landoj devas konscii, ke ili vere havas la samajn problemojn, kaj ke ili akiras la plej bonajn rezultojn se ili harmonie kune laboradas man-en-mane. La ekonomiaj problemoj estas la samaj en oriento kaj en okcidento. En ambaŭ duongloboj de l' tero la kapitalistoj penadas, iom laŭ sama sistemo, elsuĉi el Laboro sangon kaj medolon; kio solvos tiujn problemojn en Eŭropo, tio solvos ilin ankaŭ en Azio.

La socialista movado iĝu misia movado; broŝuroj kaj aliaj propagandaj estu tradukataj kaj publikataj en ĉiuj lingvoj. Jen la plej urĝa bezono de nuntempo. Kaj se la socialistaj

organizaĵoj volus ĉiujare destini sumeton al centra kaso por traduko kaj preso de standardverkoj alilingven. tiu mono certe estus elspezita utile. La mondo, pro disvolvo de fervoja komunikado kaj pro tuj estonta enkonduko de aerŝipado, rapide maleksplancias. Tre baldaŭ ĉiuj nacioj estos apudpordaj najbaroj, kaj kio rilatos al unu, tio rilatos ankaŭ la aliajn. Estas do grave, ke en ĉiuj landoj la klasoj laborantaj plilargigu sian spiritan vidofieron, kaj interesiĝu pri laborproblemoj en eksterlando. Ili devas pensi ankaŭ pri estonteco, kaj laŭgrade prepari la vojon al internacia kaj universala unueco pri ĉiuj laborproblemoj. Por tio estus belega afero, se la Intern. Oficejo Socialista (I. O. S.) havus je sia dispono monojn por traduko kaj publikado en ĉiuj lingvoj, de certaj socialistaj standardverkoj.

La kristanaj eklezioj elspezas ĉiujare milionojn da Sm. en tiu direkto kaj rikolto ne forrestas. Kial ne farus I. O. S. same? kial ne akirus ĝi bonajn rezultojn de simpla, facila metodo? Kristana biblio estas presita en ĉiuj lingvoj; estas la devo de l' socialistoj tuj fari la samon kun siaj standardverkoj. Kiu volas iniciati pri tio? Estas klare, ke la I. O. S. devas preni la demandon en mano, por eviti konfuzon. Sendube, la unua paŝo en tiun direkton devas esti: eldono de socialista standardverko en Esperanton, ĉar tia verko trovos vendon eĉ en Hinujo, kie Esperanto sin estas tre rapide disvastiĝanta."

J. A. JACKSON.

El la „Ĥina Socialisto“, red. de I. S. R. tuj petis kaj afable ricevis kvanton sufiĉan por povi prezenti ekzempleron al ĉiuj legantoj de nia Revuo. Se oni sendas al la adm. de „Ĥina Soc.“ 1¹/₄ Sm., oni ricevos ĝin dum unu jaro (52 numerojn).

El Hungarujo.

La Budapeŝta laboristaro ankaŭ festis la unuan de Majo. La esperantistaj laboristoj sub verda standardo marŝis en la procesio, farante grandan sensacion kaj propagandon por Esperanto. En la urba ĝardeno, kien la laboristoj iris, kelkaj gazetoj fotografis por si la esperantistan grupon. La laboristoj laŭte manifestadis kontraŭ la milito.

La socialistoj tiel sovaĝe kaj barbare persekutas ĉi tie la sindikalistojn kaj anarkiistojn, ke eĉ la rusa polico povus lerni de ili. En iu fabrikejo laboris unu sindikalista, forkurinto de militservado el Serbujo. Li apenaŭ balbutas hun-

gare, kaj la socialistoj tamen volis devigi lin por aboni la „Nepszava” (organo de soc. dem. partio). Sed li rifuzis tiun ĉi arogantecon dirante, ke ĉiu havas la rajton aboni kaj legi tiun gazeton, kiu plaĉas al li. Plue li esprimis, ke li nenian tiranecon toleras super si. Bone, diris la socialistoj, se vi ne abonas, ni baldaŭ helpos al vi! kaj oni forŝtelis liajn laborilojn. Kiam eĉ tio ne utilis, kelkaj demagogoj dungis apaŝojn por frapigi lin, mensogante al ili, ke la serbo estas strikrompinto. Tagmeze, kiam la laboristoj elvenis el la fabrikejo, la subaĉetitaj apaŝoj volis ataki la sindikaliston, sed anstataŭ lin, ili frapis alian, „senkulpan” homon. Nur poste oni rimarkis la eraron kaj volis bati la veran „kulpulon.” Sed li elprenis sian revolveron kaj neniun lasis proksimiĝi al si. Fine, oni komencis jetadi al li duonbrikojn kaj lia situacio fariĝis danĝera. Tiam li pafis inter la persekutantaron kaj unu grave vundiĝis. Dume alvenis policano, kiu arestis la sindikaliston kaj poste akompanis lin al la policejo, kie oni baldaŭ forpermesis lin.

Per tiaj malnoblaj rimedoj batalas ĉe ni la socialdemokratoj! Ili piedpremas ĉies la piej elementajn individuajn rajtojn kaj liberecon! Ĉu post tio ĉi havas iu la kuraĝon nei, ke ili ne je la mensogo kaj perforteco bazas la venontan socion?!
SINCERA.

El Nederlando.

Okaze de la oficiala malfermo de la Pacpalaco, la 29an de Aŭgusto en Hago, la Internacia Kontraŭ-militarista Societo en Nederlando organizos en nomita urbo, la 31an de Aŭgusto internacian pac-demonstracion. Diversaj parolantoj, en- kaj ankaŭ eksterlandaj, parolos.

En Nederlando multaj vojaĝ-societoj formiĝas kaj oni klopodis akiri eksterordinare malkarajn vojaĝokazojn.

Ankaŭ en aliaj landoj estas, kiel ni sciigas, simpatio por tiu demonstracio.

El Rumanujo.

Malĝoja datreveno. — Pasis ses jaroj de kiam la rumana kamparano, — malsata kaj persekutata, senrajta kaj eterne kondamnita labori de frumateno ĝis vespero por produkti riĉaĵojn por la kelkmiloj da kapitalistaj bienposedantoj de Rumanujo, — provis postuli rajton je pli bona vivo kaj pensis, en sia naiveco, forjeti la jugon premantan sur sia dorso. Tio okazis dum la printempo de l' jaro 1907, kiam

post la jubilea festo de 40-jara regado kaj subpremado de reĝo Karolo unua, la kamparanoj eksplodigis memorindan ribelon, je grandega surprizo de la registaro kaj politikuloj. Komenciĝinte unue en norda Moldavio, rapidege ĝi etendiĝis en la tuta lando.

La registoj ĉiupartiaj montriĝis tre mirigitaj kaj ŝajnis ne povi kompreni la veran kaŭzon de tiu neatendita movado de la kamparanoj, kiujn ili ekspluatis senkompate. En tiuj cir-konstancoj, nesciante kion fari, sur la scenejo de l' parlamento ili sin kisis kaj premis la manojn, solene deklarante kunlabori por enkonduko de leĝoj por la plibonigo de la vivo de kamparanoj.

Sed anstataŭ plenumi tiujn promesojn faritajn „en la nomo de la reĝo”, ili satigis la ribelintojn per kugloj. Senkaŭze kaj post la ribelo, la rumana armeo, laŭ ordono de ebriaj oficiroj, prefektoj kaj bienposedantoj, mortigis ne malpli ol 11000 kamparanojn, junaj kaj maljunaj; sennombraj vilaĝoj estis detruataj per la kanonoj, kaj la malliberejoj jam ne povis enhavi la multon da malliberigitoj.

Por malhelpi novan ribelon, oni starigis en ĉiuj vilaĝoj ĝendarmojn kaj oni faris „reformleĝojn”, kiuj enkatengas plie la kamparanojn kaj donas pli da forto al la bienistoj por ekspluati la laboron de tiuj malfeliĉaj terlaboristoj.

La soc.-dem. partio en Bukareŝti kaj en aliaj provincaj urboj memorigis la datevenon de l' jaro 1907, kiam la reganta klaso el Rumanujo dronigis en sango la postulojn por plibona vivo de la rumana kamparano, kiu estas la fundamento de ĉi tiu lando.
EMANOIL J. NICOLAU.

El Rusujo.

En pereigantaj lokoj de politika ekzilo. En gazetoj ofte oni komunikas pri novaj grupoj da ekzilitoj en Siberion; sed ni tre malmulte scias pri tio, kio okazas tie, en tiaj „pereigantaj lokoj”, kiamaniere ekzistas kaj kion sentas, travivas la ekzilitoj. La sciigoj pri la vivo de ekzilitoj havas nekompletan, iom hazardan karakteron.

Antaŭ mi kuŝas amaso da leteroj de ekzilitaj instruistoj, en kiuj ili priskribas sian vivon per fortaj koloroj.

Antaŭ ĉio la ekzilito estas jetata en fremdan al li nekutiman klimaton, sen kiaj ajn monrimedoj kaj ekster iu ebleco gajni ilin per propra laboro. La monhelpo, donita al ekzilitoj de registaro, egalas ĝis 6 Sm. monate (por la neprivilegiitoj, kiuj estas en plejmulto inter la ekzilitoj). La

mizera registara mondonajo ne sufiĉas eĉ por pagi ĉambron, kiu ja kostas de 2 ĝis 3 Sm. monate. Kio do restas por vivi, precipe en tiaj ne maloftaj okazoj, kiam oni donas al ekzilitoj entute nur po 2 Sm. 40 Sd. monate? Memkompreneble estas do, ke la leteroj de ekzilitaj instruistoj estas plenigitaj per plendoj pro sia kritika materiala stato. Notu, ke la instruistoj troviĝas ankoraŭ en kompare pli bonaj kondiĉoj ol aliaj ekzilitoj: ĉar iafoje ili ricevas subtenon de komisiono de helpado al suferantaj geinstruistoj; tia komisiono lokiĝas en Centra Oficejo de tutrusa instruista asocio. „Malfacile estas ekzisti”, skribas unu instruisto, „precipe nun, kiam la nutroproduktajtoj fariĝis tie ĉi pli multekostaj, dank' al plinombriĝo de ekzilitoj; kaj mankas la eblo ion gajni. Entute — ju pli la tempo pasas, des pli malbone; la loĝejoj fariĝas plimultekostaj post ĉiu sekvanta monato, la administracio eldonas la mondonajojn treege malakurate, kaj ĉiamfoje preskaŭ post batalo vi ricevas ĉi tiujn mizerajn spesojn. Multaj kamaradoj havas nek piedvestojn, nek korpevestojn, kaj, aldone, oni forpelas ilin el loĝejoj”.

„Malbone estas — mono mankas ĉe ĉiuj”, komunikas alia, „ni estas devigataj nutri nin per okzalo kun pano... Per okzalo ni vivis dum la tuta monato, poste ni vivis per sola pano... Nun jam dum kelkaj tagoj ni nenion manĝis...”

„...En nia urbo loĝas pli ol 150 ekzilitoj”, oni skribis al ni el urbo Narim, „tre nemultaj el ili havas laboron; la plejmulto vivas per espero trovi iam ajn laboron, kaj dume vivas malsate...” k.t.p. Ni povas citi kiom vi volas da similaj eltirajoj el leteroj, sed eĉ suprecititaj sufiĉas...

En tiaj iom simplaj, sed notindaj vortoj sin kaŝas la terurajo de malsato, malvarma vivaĉo per „okzalo” kaj „pano”, sen varma vesto, kaj kelkfoje eĉ sen loĝejo...

Por ĉia prudenta homo estas klare, ke ne nur estas „malfacile” ekzisti en similaj kondiĉoj, sed tute neeble. Aldonu al suprecititajtoj la nekutiman klimaton — la severan vintron — kaj vi komprenas la sopiron de unu korespondanto: „La fantomo de malsata kaj malvarma morto min persekutas”, kaj vi ankaŭ komprenos tion, ke en sia tragedia stato la malsataj, malsanaj homoj, kun nervoj senlime streĉitaj, detiritaj perforte de l' socio, de familio, senigitaj ne nur de mensa nutraĵo, sed ankaŭ de pano, povos decidi fari ĉion. Oni atentu, ke estas en ekzilo ordinaraj homoj, ne herooj, kaj eĉ kelkaj sufiĉe malfortaj kaj malmulte-ideaĵ. Dank' al ĉiama malsato, malvarmo kaj nerva mal-

sano la ekzilitoj ĉiam malsanas, kuŝante en siaj loĝejoj, plejparte senigitaj eĉ de medicina helpo; kaj ili estas — en simila klimato — destinataj absolute pere. Ili tamen tute ne ĉiam sukcesas ricevi translokiĝon en lokon kun pli konvena klimato. Krom tio, la ekzilitoj iafoje estas ekzilitaj al lokaĉoj, kie ili neeviteble iĝos viktimo de abomena malsano. „Ni estas lokitaj en centro de „Ostjakaj” 1) nomadejoj en Gurkutska uesdo (de Tobolska gubernio). Ĉirkaŭ nia vilaĝo estas dislokitaj la „Ostjakaj”, „jurtoj” (konusformaj kabanoj el arbtrunkoj, kovritaj per arbŝelo. Rim. de Trad.); en plej proksima rusa vilaĝo absolute tuta loĝantaro estas infektita per sifiliso kaj trakemo (okulmalsano); en nia vilaĝo ankaŭ la duono da vilaĝanaro estas sifilisuloj; la mastroj de mia loĝejo estas ankaŭ sifilisuloj”. (Daŭrigota).

Protesto.

La centra komitato de l' Asocio Internacia de la Esperantistoj Progresemaĵ sciigas ĉiujn legantojn kaj precipe sekretariojn de Germana Kongreso el Frankfurt, redakciojn de „Antaŭen”, „Kulturo” kaj „I. S. R.”, ke ĝi mandatis sian Leipzigan liberigstelanon Mehlhorn por ĝin reprezenti antaŭ la Frankfurta Kongreso.

Ni aldonas — por ke ĉiu sincera kamarado bone sciu — ke ĝia delegito kaj k-do Voigt klarigis kaj defendis nian vidpunkton. La komitato sendis al la Kongreso letere simpatian deziresprimon kaj la Kongreso sendis al ni dankan poŝtkarton subskribitan de 4 sekretarioj.

Ni konstatis la silenton intence faritan rilate al nia asocio en ĉiuj raportoj publikitaj.

Dankon por tia simpatia akcepto!

Laŭ ordo: La Sekretario, HUBERT.

1) „Ostjakoj” estas nomadoj de Norda Siberio. Rim. de Trad.

KORESPONDADO.

Germanujo: K-do W. Schmidgall, Schwabstr. 18/III, Stuttgart, dez. kor. letere kaj interŝanĝi il. pk. — K-do A. Resse, Capellenstr. 9, Hannover-Kleefeld, dez. kor. kun geeksterlanduloj; ĉiam respondas. — Leipziga Liberiga Stelano petas informojn pri opinioj rilate al intern. unuigo esp. laborista tutmonde: skribu al Artur Mehlhorn, Edlichstrasse 23, Leipzig-Sell. — K-do Fr. Richter, Aeuss, Zör-

bizerstr. 36*d*, Bitterfeld, dez. kor. kun ĉiulandaj gek-doj; ĉiam tuj resp. — K-do Fr. Andersson, Alt-Mühlenweg 30, Dortmund, dez. kor. — K-do Hans Duffels, Untere Koningstr. 79 I, Cassel, dez. kor.

Nova adreso de K-do Artur Mehlhorn (de 1a de julio): Konradstr. 9/II, Leipzig-Neuschönefeld.

Nederlando: K-do N. Bunschoten, Koningstraat 299, Den Haag (Hago), dez. kor. p. i. kun serbaj, bulgaraj, grekaj, montenegraj kaj turkaj k-doj. — K-do H. Last, Papenpad 39, Zaandam, dez. kor. — K-do J. Hummel, 86 Straalscheweg 86, Venlo, dez. kor. pri servokondiĉoj kaj organizado de fervojistoj kun ruĝ-verdaj fervojistoj de ĉiuj landoj. — W. Joppe, Lambertusstr. 95*b*, Rotterdam dez. kor. per il. pk. — A. Bons, Wilhelminastr. 14, Rotterdam, dez. kor. per il. pk. — Ĉu k-do U. en Voronej ne ricevis leteron de k-do Sawade, Amsterdam?

Francujo: K-do Paul Lécuru, rue de Soissons 18, Compiègne, 19-jara, dez. kor. per il. pk. kun ĉiulandaj gek-doj; tuj resp. — Ĉu M. Işoveanu el Bukurest, ne ricevis la martan poŝtkarton de Strub, 77 Rue Lafayette, Rouen, Francujo? Bonvolu respondi.

Aŭstrujo: K-do Frant. Ĉefek, Liebharts-gasse 55 I 3, Vieno XVI, deziras interŝ. il. pk. — K-do Frant. Kubát en Sichov 27, Bohemujo, P. Koloveč apud Domazlice, dez. kor. per leteroj.

Ĉiuj legantoj de I. S. R. posedantaj tradukajojn de revoluciemaj kantoj, estas petataj sendi ilin al mi. Sed kiel eble ankaŭ la notojn. Tie ĉi en Germanujo estas tre malfacile havigi socialistajn notojn. Ekzemple la notojn por la „Internacio” mi ĝis hodiaŭ serĉis vane. Tial, kamaradoj, sendu ankaŭ notojn. Samtempe mi deziras korespondadon kun eksterlandaj samideanoj (ankaŭ Angloj): Max Molinus, Warstrasse No 7 II, Hannover (Germanujo).

La Esp. Soc „Paco kaj Amo” en Barcelona aranĝas Esp. ekspozicion, kaj por sukcesigi ĝin bezonas la helpon de l' k-doj; ĝi do petas bonvolan sendon de ĉiajn e-ajojn; adreso: Str. Montseny 67, 2^o, Barcelona, Hispanujo.

Acetebla ankoraŭ kelkaj jarkolektoj de I. S. R. 1910, 1911, 1912; prezo 1.40 Sm. ankaŭ plena jarkolekto de „Germana Esperantisto” 1907 (kun lit. aldono „Liberaj Horoj”), prezo 2 Sm. — Jarkolekto de „La Revuo”, int. monata lit. gazeto, 1907, prezo 3 Sm.